

## De la katedro

### La Zamenhofa Heredaĵo en la Muzeo pri la Judoj en Pollando

En la tagoj 13-15 decembro 2017 en Varsovio okazis esplorateliero pri la Zamenhofa heredaĵo inter judismo kaj Esperanto en la Muzeo POLIN, kies celo estas gardi la memoron de la judoj kiuj vivis sur la pola sojlo. La konstanta ekspozicio de la mil jaroj de juda historio en tiuj teritorioj – kiu ja okupas 1000 kvadratajn metrojn da spaco – konstruiĝis sur la originalaj ŝtonoj de la strato kiu hodiaŭ portas la nomon de la fondinto de Esperanto, Zamenhof, en la centro de la juda kvartalo, ne malproksime de la juda tombejo kie troviĝas interalie multaj membroj de la familio Zamenhof.

La dato elektita por la ateliero tute ne estis hazarda: la ĉefa organizanto, Federico Gobbo, de la Universitatoj de Amsterdamo kaj Torino, volis festi la heredaĵon de Zamenhof la Zamenhofan Tagon de la Zamenhofa Jaro, tio estas la 15an de decembro 2017. Kune kun la kolegino Liliana Ruth Feierstein, de la Universitato Humboldt en Berlino kaj de la Centro de Judaj Studoj en Berlino kaj Brandenburg, la du fakuloj zorgis inviti esploristojn konatajn je monda nivelo pri esperantologio kaj judaj studoj, kaj aparte pri *Yiddishkeit*, tio estas Jideco.

La figuron de Zamenhof oni analizis ekde diversaj perspektivoj pri multaj aspektoj rilataj al lia duobla projekto lingva kaj religia-filozofa, alivorte Esperanto – inkluzive de la variaj pra-Esperantoj – Hilelismo (la religia parto) kaj Homaranismo (la filozofia parto).

Paralele al la esplorateliero, kiu estis organizita laŭ invito do sen ekstera publiko, Federico Gobbo pretigis publikan lecionon en la angla kie li legis diversajn originalajn poemojn en Esperanto kaj eltirojn el la Zamenhofa verkaro, kun oportunaj komentoj, montrante kiom aktuala ja estas la homaranisma filozofio nuntempe.

Ĉiuj informojn menciitaj supre estas je dispono en la sekva retpaĝo (en la angla):

<http://www.polin.pl/en/event/is-it-possible-for-all-people-to-speak-the-same-language>

Federico Gobbo (Amsterdamo / Torino)



tahelaĵo Muzeo POLIN

### Ĉeesto Esperanto Nederland ĉe eventoj okaze de la Zamenhof-jaro

La 11an de decembro 2017 en sidejo de UNESKO en Parizo okazis memorkonferenco por la centa datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof. Andries Hovinga ĉeestis nome de Esperanto Nederland. Okazis diversaj prelegoj. Temoj: tutmondiĝo, interreto, Unesko-Kuriero kaj "kiel statas Esperanto, cent jarojn post la morto de Zamenhof?"

Resumoj vi povas legi en tiu-ĉi paĝo: <https://esperanto-france.org/jaro-Zamenhof>.